

Algi

DIA REGNO

DIA REGNO

⊕ dumonata kristana revuo en esperanto ⊕ n-ro 5 (848) 2004 ⊕

ISSN 0167-9554

KONGRESA NUMERO



La nova prezidanto, Philippe Cousson kaj la baldaŭa redaktoro Bengt-Olof ÅRADSSON, dum la jarkunveno. (Fotis REA)

Raportoj pri la kongreso.
Tekstoj el la kongreso kaj el aliaj kongresoj

KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala, kunlaboranta
kun UEA

*Celo: Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj
landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri
Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet, FR 86340
Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0)5 49 46 80 21;
✉ diaregno@altern.com.

Sekretario: Els VAN DIJK-KUPERUS

✉ Koningsmantel 4, NL 2403 HZ Alphen a/d Rijn,
Nederlando; ☎ +31 1724 20222;
✉ j.a.van.dijk@hetnet.nl

Kasisto: Siegfried KRÜGER

✉ Dinkelsbühler Str. 12, DE 74074
Heilbronn, Germanio; ☎ +49 7131 162688;
✉ SLKrueger@gmx.de

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume
€20,- ☉ Membro-subtenanto €30,- ☉ Nura
abono: pagante rekte al KELI €16,- ☉ pagante al
Libroservo €18,- Sendoj de okcidentaj monbiletoj
per registrita letero al la kasisto de KELI ☉ Se
estas en via lando UEA—poŝtĝirkonto (informiĝu
ĉe UEA) bonvolu preferi pagi al UEA por konto
kelk-p de KELI ☉ Nederlanda poŝtĝirkonto de
KELI: 5506132.

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo — ISSN 0167-9554

Redaktoro: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet, FR 86340
Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0)5 49 46 80 21;
✉ diaregno@altern.com.

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ
egalvaloro. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la
kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la
aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe,
ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ
traduko oni sendu al la Redaktoro.*

**Enpaĝigo, grafika prilaboro, presado
kaj ekspedado:**

Eldonejo HEJME Kazimierz LEJA
✉ p.f. 59, PL 41-250 Czeladź, Pollando
☎ +48 32 2650038; ✉ kleja@hejme.e-tools.pl

ENHAVTABELO

- 99 Kongresa temo: GRACO
- 101 Kongresaj impresoj
Raporto de la KELI—jarkunveno
- 104 Mia graco suficas por vi
- 107 La graco de Dio
- 108 2 Korintanoj 12:1–10
- 109 Se plaĉus al la Dia graco
- 111 Valdanoj
- 113 IKUE—KELI ĉe la UK en Pekino
- 114 Esperanto kaj kristanismo
- 117 18a Internacia Interreligia Kongreso
- 119 Morto, kie estas via venko?
- 120 La mezuro de Dia kompatemo.

Redaktoroj vortoj

Karaj gefratoj en Kristo,
Kiel vi povos legi en ĉi tiu numero, okazis kel-
kaj ŝanĝoj en la Estraro de nia Ligo.

Tiu ĉi teksto estas la antaŭlasta redaktora arti-
kolo, kiun mi verkos. Mi jam estas prezidanto de
KELI. Ekde januaro 2005 Bengt-Olof ÅRADSSON,
kiu kun mi ĉeestis la kongreson en 1977 en Edin-
burgo, kiel junulo, fariĝos redaktoro de *Dia Re-
gno*. Ĉiu redaktoro metas en la revuon sian spu-
ron. Vi do ricevos venontjare 'novan' revuon.

Dum mia redaktora periodo, pli ol 15 jara, mul-
to ŝanĝiĝis en la tekniko (mi komencis sen kom-
putilo, kaj iom post iom ĉion faris per komputi-
lo, komencis per „helika” poŝto, poste per fakso,
kaj fine la uzo de la interreto fariĝis nepara), en la
periodeco (de monata al dumonata), en la enha-
vo, kaj ankaŭ samtempe mi fariĝis malpli juna.
Kiam mi prenis tiun ŝarĝon, mi diris: por dek ja-
roj, sed mi restis dek kvin.

Mi deziras multan benon en tiu responde-
co al mia amiko Bengt-Olof, kaj ankaŭ al la Li-
go per ĝi.

Antaŭ kelkaj tagoj, mi estis kun la nova est-
rarano Samuel GAILLARD ĉe budo en la kunveno
de la Franca Protestanta Federacio, kie ni havis
kelkajn kontaktojn. La etoso ĉirkaŭ Esperanto,
ankaŭ en kristana medio ŝajne ŝanĝiĝas. Niaj Li-
go kaj organo eniras novan periodon, post la ora
epoko BURKHARDT. Ili fariĝos, kion ni faros el ili.

Ek al la laboro, plenaj de espero.

Philippe COUSSON

Impresoj de la 54a Kongreso de KELI 31.7.2004 ĝis 7.8.2004

KONGRESA TEMO: GRACO

La ĉi-jara KELI-kongreso okazis en
la Moravia urbo Bystriče pod Hostý-
nem. Kiel kongresejo funkciis ripoze-
jo/feriejo de la Evangelia Eklezio de Bo-
hemia Kunfrataro, kies nomo estas *So-
la Gratia*. Krom la kongresejo kaj dor-
mejoj estis ĉarma, moderna preĝejo
je nia dispono. Ĝi ankaŭ funkciis kiel la
kongresa prelegejo. Plue ni ĝuis dekli-
van parkon kaj parkejon. En la ĉefdomo
troviĝis 2 manĝejoj, bufedo kaj tera-
so kiu invitis al interbabilado kaj ripo-
zo. La kongressemajno estis benita kun
agrabla vetero kaj bona etoso.

Preskaŭ ĉiun tagon okazis matena,
tagmeza kaj vespera preĝoj. Albrecht
KRONENBERGER afable kaj lerte gvidis
la komunan kantadon kaj tiel ni ankaŭ
rememoris Adolf BURKHARDT kies for-
paso profunde influis la kongressemaj-
non. Ernst LEUZE aliĝis kaj ni ege ĝuis
la pianludon kaj orgenkoncerton de tiu
entuziasma kaj profesia muzikisto.

Sabaton vespere bonvenigis Pavel
POLNICKÝ la kongresanojn kaj la estri-
no de la kongresejo (S-ino Jana JEŽIKO-
VÁ) salutis. La kongresanoj sin prezen-
tis laŭ nacioj. Partoprenis 62 kongresa-
noj el dekunu landoj. La vespero finiĝis
per la vespera preĝo.

La dimanĉan diservon gvidis Al-
brecht KRONENBERGER kaj Éva FAR-
KAS. Ni sekvis grandparte la ordon de
la diservo de la Lima-liturgio el *Adoru*.
Ernst LEUZE akompanis la kantadon.
Ĉiuj estis invititaj partopreni la Sank-
tan Manĝon. Posttagmeze okazis ofi-

ciala akcepto flanke de la urbestro en
la urba kastelo. La kastelo funkcias kiel
urbdomo kaj loka gvidantino gvidis la
kongresanojn tra la salonoj kaj kelo kun
art-ekspozicio. En la preĝejo Sankta
Jiří, barokstila preĝejo el 1774, okazis
orgenkoncerto de Ernst LEUZE, antaŭe
anoncita en la urbaj komunikiloj. Tial
ankaŭ ĉeestis enloĝantoj. Al la vespera
programo en la kongresejo estis ankaŭ
invitataj la urbaj enloĝantoj. Kelkaj elu-
zis tiun eblecon kaj ili povis ĝui kun ni
elstaran klasikan koncerton de la kan-
tistoj S-ro SMYČKA kaj S-ino KUDLI-
KOVÁ. Piane akompanis S-ro ZIMMEL.
Ingeborg VAN DIJK anoncis la progra-
merojn. La programo enhavis tre va-
riajn kantojn.

Post la matena preĝo de lundo en-
kondukis Philippe COUSSON, Albrecht
KRONENBERGER, Éva FARKAS kaj Jac-
ques TUINDER la kongresan temon „Gra-
co”. Posttagmeze veturigis nin aŭtobuso
al la subĉiela muzeo en Rožnov pod
Radhoštěm kun multaj interesaj, anti-
kvaj konstruaĵoj.

Al la vespera programo kontribuis
kongresanoj per ludoj, ŝercoj kaj ko-
muna kantado.

Mardon matene prelegis Zoltan So-
MHEGYI pri la Valdana Eklezio en Italio.
Poste sekvis prelego de S-ro KOČVARA.
En la subtera etaĝo de la preĝejo estis
ekspozicio de fotoj faritaj en Nepalo far
la estrino de la kongresejo. Ŝi rakontis
pri la fotografitaj homoj kaj vidindaĵoj.
Philippe COUSSON prelegis pri „La re-

formita liturgio kiel proklamo de la Graco". Vespere koncertis partoprenantoj.

Merkredo estis la tago de la tuttaga ekskurso. Aŭtobuso veturigis nin al la urbo Kroměříž.

La urbo situas ĉe la bordo de rivero Morava kaj ĝi havas 25 000 enloĝantojn. Dum jarcentoj ĝi funkciis kiel la somersidejo de episkopoj de Olomouc.

Ni vizitis la ĉefepiskopan kastelon kun impona ĝardeno. Gvidistino gvidis nin tra ĝiaj salonoj. Impona estis inter alie la historia biblioteko kun kvardek mil antikvaj libroj kaj kelkaj grandegaj malnovaj globusoj. Sub la kastelo troviĝis ege granda vinkelo. Post la tagmanĝo en restoracio la kongresanoj vizitis la florgardenon (Květná zahrada). Ĝi datiĝas el la 17a jarcento kaj ne estis ŝanĝita ĝis hodiaŭ.

Ĵaŭdon matene okazis la jarkunveno kies raporto aperas aliloke. Post la tagmanĝo ni ekskursis aŭ promenante aŭ per aŭto al la sanktejo sur la monto Hostýn je alteco de 736 metroj. Ĝi estas la plej grava pilgrimloko en Moravio. Sur la montosupro malkovris la arĥeologoj spurojn de antikva kelta restado.

Vendredon rakontis Olavi KANTELE pere de diapozitivaj pri la preĝejoj tra la jarcentoj.

Posttagmeze estis ebleco sin prepari por la adiaŭa vespero. Je la 16a horo ni ĉeestis diservon laŭ la ordo de diservo el Taizé. Gvidis Albrecht KRONENBERGER kaj Philippe COUSSON kiu ankaŭ predikis.

Ingeborg VAN DIJK kaj Zoltan SOMHEGYI gvidis la adiaŭan vesperon al kiu kontribuis plurajn kongresanojn. Fine de la vespere dankis la prezidan-

to, Philippe COUSSON, la organizantojn Pavel POLNICKÝ kaj lian fraton Tomáš. Ili ricevis donacon kiel esprimon de nia dankemo. Krome Philippe dankis al Albrecht KRONENBERGER, Ernst LEUZE, ankaŭ Ingeborg VAN DIJK kaj Samuel GAILLARD kiuj instruis la gekomencantojn.

Sabaton forveturis la partoprenantoj al siaj loĝlokoj. Ili kunportis certe la plej diversajn rememorojn al, laŭ mi, sukcesplena kristana kongreso okazinta en bona harmonio.

Mi konscias ke mi ne menciis ĉiujn nomojn de la kontribuantoj al la programo.

Per tiu ĉi raporteto mi nur donas impreson.

Els VAN DIJK-KUPERUS



Els van Dijk, sekretariino.
(Fotis REA)


Kongresaj impresoj

Ĉarma ripozcentro de ĉeffrata evangelia eklezio *Sola Gratia* en Bystřice apud Hostýn gastigis ĉi jare 60 gekongresanojn el 12 landoj. Kongresanoj preskaŭ plenigis loĝlokojn de la centro, kiu ebligis al ili krei veran familian rondon. Organizaj aferoj kuŝis sur ŝultroj de frata duopo POLNICKÝ, kiu estis tuttage je dispono de kongresanoj.

Verŝajne unufoje en la historio de KELI-kongresoj ni estis akceptitaj de urbestro en kastela Ronda salono, kie estis ankaŭ la kongreso solene malfermita.

Kion menci el abunda programo? Mi mem aprezas tri kanthorojn kun *Adoru* en la manoj gviditaj de pastro KRONENBERGER, ambaŭ koncertojn (orgena kaj operkantista) kaj du distrajn vesperojn, kiuj pruvis, ke partoprenantoj estas ne nur konsumantoj de preparitaj aferoj sed ke ili scias zorgi pri propra amuzado.

Eble la programo estis troplenigita, por ĉeesto de pli multo en la programo helpus diskutrondoj en kiuj oni pritraktus kongresan temon anstataŭ unu aŭ du prelegoj. Ankaŭ anstataŭ



La ĉeestantaro dum la jarkunveno.
(Fotis REA)

unu ekskurso mi preferus renkontiĝon kun lokaj ekleziaj komunumoj, kie ambaŭ flankoj povus prezenti sin kaj interkomunikiĝi.

En la lasta numero de *Dia Regno* la redaktoro menciis, ke la kongreso estos la unua post Adolf. Mi aldonas, ke ĝi estis ankaŭ kongreso sen Adolf (persone kaj memordediĉe).

Kongreson kies temo estis „La graco” ni certe travivis en ĝi. Malgraŭ pesimismaj prognozoj surbaze de malkreskanta kaj maljuniĝanta membraro la etoso de la kongreso estis esperoplena, bazita ne sur niaj fortoj kaj kapabloj sed sur vera Dia graco.

Pavel TICHÝ

Raporto de la KELI-jarkunveno, la 5an de aŭgusto 2004

Partoprenis la jenaj estraranoj: Jacques TUINDER, Philippe COUSSON, Els VAN DIJK, Bengt-Olof ÅRADSSON, Irén BAGI, Pavel POLNICKÝ, Zoltan SOMHEGYI, Karl-Heinz SCHAEFFER reprezentis la kasiston Siegfried KRÜGER, kiu ne povis partopreni la kongreson pro malsano.

1. La prezidanto, Jacques TUINDER bonvenigis ĉiujn. Ni kantis numeron 351 (1, 2, 5) el *Adoru* kaj Jacques laŭtlegis parton el Luko 4. La estraranoj estis prezentitaj.

2. Elekto de kunprotokolantoj. Anoncis sin Wil VAN GANSWIJK kaj Éva FARKAS.

3. Rememoro pri la mortintoj. Britio: Phyliss STRAPPS, Martin HOWARD, Ena SHORTLAND. Svedio: Stig KINNANDER, Kerstin SJÖHLIN, Olle OLSSON. Germanio: Hella LANKA, Adolf BURKHARDT, Karl-Heinz GAST. Nederlando: Zwaantje BOVENSLIM, Jaap VAN DIJK.

4. Sekretaria raporto. Pro malsano kaj morto de sia edzo, la sekretariino ne povis sendi jarraporton. Pro tio ŝi laŭtlegis mallongan raporton en kiu ŝi eksplikis kial KELI estis enskribita laŭleĝe en la Nederlanda Ĉambro de Komerco: ĉar la bankkonto de KELI restis ĉe la Nederlanda Postbank. La antaŭulo de Siegfried estis la nederlandano Leen HORDIJK. Li tradukis la Statutojn kaj Regularojn de KELI nederlandlingven kaj enskribis KELI-n. La nuna kasisto loĝas en Germanio sed la konto restis ĉe la Postbank. Ĉiuj informoj de la Postbank kaj la Ĉambro de Komerco estas senditaj al la sekretariino. Laŭ la statutoj de KELI estas la sidejo de la unuigo en la lando de la sekretario. Ĉiuj ŝanĝoj en la estraro estu menciitaj al la Ĉambro de Komerco.

5. Kasista jarraporto. La anstataŭanto de la kasisto eksplikis kelkajn detalojn. Ĝenerale la kotizenspezoj malaltiĝis pro malkreskanta membraro kaj malpli da kontribuoj por la Adopta Kaso. La kapitalo malgrandiĝis.

6. Kaskontrola raporto. Karl-Heinz SCHAEFFER kaj Horst HUB kontrolis la librotrenadon de la kasisto, la spezokontojn kaj bilancojn je 31.12.2003. Ili trovis ĉion en ordo kaj al ĉiuj demandoj ili ricevis kontentigajn respondojn. Ili rekomendis al la jarkunveno malŝarĝi la kasiston, iu proponis ankaŭ malŝarĝi la estraron. Ambaŭ estis malŝarĝataj. La sekvontan jaron la samaj personoj kontrolas la kason.

7. Buĝetoj kaj rezultoj. La buĝetoj 2004 indikis modestan gajnon de eŭroj 111,- sed en 2005 aperos perdo de eŭroj 1.389,-. La persistaj kostoj estis en 2004 buĝetitaj je eŭroj 3.700,- sed en 2005 okazos altiĝo de kostoj al eŭroj 5100,-, interalie pro la VAT-impoto de 22%. Pollando eniris la EU. Plialtiĝo de la kotizo ne estas solvo, sed novaj pagantaj membroj! Korekta-

do en la buĝeto 2003: elspezoj entute devas esti eŭroj 4.710,- anstataŭ eŭroj 5.150,-. La membroj aprobis la la buĝetojn.

8. Raporto de la redaktoro. La redaktoro ricevis pli da materialo ol dum la antaŭaj jaroj dank' al la interreto. Li eksplikis kelkajn teknikojn rilate la laboron kaj enhavon de *Dia Regno*. Mankis reagoj al artikoloj. Bildoj oni sendu al la redaktoro kaj persisto. Por la kontrolado estas uzita 'PDF-formato'. La redaktoro ne havis sufiĉe da tempo okupiĝi pri la revuo en la pasinta jaro. Sekvis diskutado pri senpaga dissendado 'PDF-formato' al abonantoj, pri: nur 3 numeroj jare, elektronike per la reto, informoj per la reto al landaj reprezentantoj kaj ili distribu enlande, dediĉi eldonon al Adolf BURKHARDT.

Nova kontrakto kun la presisto/eldonisto povis la estraro ankoraŭ ne subskribi. Se finance necesus la membroj akceptus kvar numerojn jare kun pli da paĝoj el malpli dika papero. La estraro esploru la eblecojn.

9. Estrarelektio. Jacques TUINDER estis pasintan jaron reelektebla nur por unu jaro ĉar ne estis alia kandidato. Nun Philippe COUSSON (vic-prezidanto kaj redaktoro) pretis fariĝi prezidanto. Samtempe li demisiis kiel redaktoro. Li redaktos *Dia-n Regno-n* ĝis la fino de tiu ĉi jaro. Jacques donis la prezidantan martelon oficiale en la manojn de Philippe. KELI do havis novan prezidanton sed samtempe estis sen redaktoro ekde 2005. Jacques restis estrarano. Britta REHM, Zoltan SOMHEGYI kaj Els VAN DIJK estis reelektitaj. Jacques kaj Philippe ricevis kiel dankesprimon kompaktdiskon. La franco Samuel GAILLARD kandidatiĝis kiel estrarano kaj la membroj aprobis lian aliĝon. Li sin prezentis al la membroj: 40 jaraĝa, edzo kaj patro de 3 infanoj, skolto kaj profesia komputilspecialisto por ĝeinstruistoj kaj iama instruisto.

10. Kongresplanoj. Éva FARKAS informis pri la 17a Ekumena Kongreso en 2005 kun la JET (Junulara Esperanto Tendaro). Ĝi okazos en Hungario, 25 kilometrojn nordokcidente de Budapeŝto en Piliscsaba (16-23 julio). La kongresejo estos novkonstruita studenta hejmo kun prelegejo, manĝejo kaj kapelo. Ĝi estos atingebla per trajno kaj aŭtobuso el Budapeŝto kaj situas apud la aŭtovojo 10. La Ekumena Komisiono respondecas kun la LKK (Loka Kongresa Komitato) pri la programo. Membroj de tiu ĉi komisiono estas de KELI: Jacques TUINDER, Éva FARKAS, Marilu MÜNGER. Ni serĉos ankoraŭ pliajn membrojn. Membroj de IKUE: Lajos KOBOR, Bernhard EICKORN, Albrecht KRONENBERGER, Ulrich MATTHIAS. La kongresurbo en 2006 estis pridiskutita. Kie organizi kongreson en tiu jaro? Ĉu estus ebleco en Rumanio? Tio propono verŝajne ne estos realigebla.

11. Ideoj kaj sugestoj de la membroj. Karl-Heinz SCHAEFFER anoncis ke ĉiuj kiuj devis pagi dum la kongreso al la kasisto, pagu al li. Jerald VEIT el Usono eldonis „365 tagoj el la Biblio”. Mendebila ĉe li. Ake AHLRÉN rakontis pri siaj spertoj. Li nomis ilin „Tri momentoj el la vivo de Esperantisto”. Wil VAN GANSWIJK heredis malnovajn fotojn de KELI-membro. La plej malnova datiĝis el 1911. La sekretariino kunportas la fotojn hejmen ĉar ŝi havas pli da malnovaj fotoj. Gerda DERCKX ŝatas dum kongreso diskutgrupojn pri bibliaj temoj en malgrandaj rondoj. Al Éva FARKAS oni sendu proponojn por la programo de la estonta kongreso. La kongresalbumo de 2003 eniros la Esperanto-bibliotekon. Kiu povos daŭrigi la libron pri la historio de KELI, „Nia Historio”, verkita de Henk DE HOOG? Jacques TUINDER informis pri siaj vojaĝoj por „Evidente” kaj la batalo kontraŭ nenecesa blindeco en malriĉaj landoj. Ágnes RÁCZKEVY


EÖTVÖS instigis sendi kongresajn fotojn al Irén BAGI aŭ Erszebet KASZAB por la kompilado de la kongresalbumo. Ankaŭ por *Dia Regno* estas fotoj bezonataj. La rezulto de la monkolleto en la Diservo estis eŭroj 145,- por „Evidente”.

12. La prezidanto, Philippe COUSSON, fermis la kunvenon kaj ni kantis el *Adoru* numeron 620.

**protokolanto Els VAN DIJK
kunprotokolantoj:
Wil VAN GANSWIJK, Éva FARKAS**

INFORMO: Post la jarkunveno okazis dua estrarkunsido. Bengt-Olof ÅRADSSON anoncis sin preta fariĝi redaktoro de *Dia Regno* ekde januaro 2005. Ni ĝojis pri tio kaj dankis lin. Restas la problemo de presado kaj dissendado kiun la estraro ankoraŭ devas solvi.

Estraro de KELI. Inter krampoj la fino de ĉies deĵorperiodo. Philippe COUSSON, prezidanto (2007); vakas vic-prezidanto; Els VAN DIJK, sekretario (2007), Siegfried KRÜGER, kasisto (2005); Bengt-Olof ÅRADSSON, redaktoro (elektita en 2004, do deĵorperiodo ĝis 2007); membroj: Pavel POLNICKÝ (2005); SOMEHEGYI Zoltan (2007); Britta REHM (2007); BAGI Irén (2006); Samuel GAILLARD (2007).



Parto de la Estraro dum la jarkunveno. (Fotis REA)

MIA GRACO SUFIĈAS POR VI (II KOR. 12:9)

Pri la temo de nia ĉijara kongreso ni tute ne bezonas longe serĉi materialon, kiu invitas al prelegado. Plenplenaj bibliotekoj ĝuste pri tiu temo. Tutsemajna kongreso ne sufiĉas por diri la lastan vorton. Ĝenerale oni difinas la nedifineblan koncepton **graco** kiel specialan helpon kiun Dio senmerite donas al homo por esti savata. Oni povas konsideri ĝin el diversaj vidpunktoj, ekzemple liturgia, teologia aŭ biblia.

LITURGIE. Oni povas studi kie kaj kiel ni renkontas la vorton GRACO en la liturgio. Por ni, esperantistoj, ADORU ĉikampe estas preskaŭ neelĉerpebla fonto. Dum la kongresa semajno ni ofte kantos pri ĝi. Kaj ni aŭdos pastron saluti nin per la vortoj: „La graco de nia Sinjoro Jesuo Kristo kaj la amo de Dio kaj la komuneco de la Sankta Spirito estu kun vi ĉiu”. Sed plurfoje (*eŭ-karistio!*) **graco**, certe la pluralo, signifas ankaŭ **dankon**: „Ni danku (*gratias agamus*) al la Sinjoro, nia Dio”.

TEOLOGIE. Dum ĉiuj jarcentoj teologoj produktis dikajn kaj imponajn verkojn pri graco. Kaj ne nur tio. Ili ankaŭ multe kaj ofte inter si polemike batalis pri la rilato inter Dio kaj homo, graco kaj pekemo, graco kaj bonaj faroj jes aŭ ne meritplenaj, supernaturo kaj naturo, elekto kaj kondamniĝo. Laŭ Sankta Tomaso de Akvino graco estas nenio alia ol ‘iuspeca partopreniga simileco al la dia naturo’. Ĝi staras, li diras, ‘inter

naturu kaj gloro’; en alia loko li instruas ke graco estas nenio alia ol ‘iusenca komenco de gloro en ni’. Nu, poste revenos la vorto **gloro** en plej brila kaj malkaŝa signifo.

BIBLIE. Mi deziras nun lasi la vojojn de liturgio kaj teologio por rekte iri al la Biblio, kiu en multegaj lokoj tuŝas la temon de la graco. Kiam mi preparis ĉi tiun prelegon, mi daŭre konsultis nederlandlingvan biblian eldonon en simpla ĉiutaga lingvaĵo. Kaj mi konstatis ke en multaj lokoj la tradukistoj ne kuraĝis uzi la vorton GRACO, kvazaŭ ĝi estus eksmodiĝinta, tute arkaika kaj nekomprenebla faktermino! Tio estas stranga, ĉar la mialingva vorto *genade* estas ‘normala’ vorto, kiun uzas kredantoj kaj nekredantoj. Kiam du knaboj inter si bataletas surstrate kaj unu sufoke tenas la alian ĉe la gorĝo, la dua petante kriegas: „Gracon! Gracon!” T.e. kompatu min, favoru min per liberiĝo, savu min de minacanta danĝero. Kaj nia reĝino povas doni pardonkarakteran gracon al krimulo.

Laŭ la inspiritaj libroj homo ne povas vivi sen graco. Graco estas pseŭdonimo de la Eternulo. La aŭtoro de la ‘Imitado de Kristo’ diras jene: „Kio mi estus sen graco, se ne ligno seka kaj trunko senutila” (III, 55). En la Sankta Skribo ni legas pri homoj, kiuj trovis gracon antaŭ la okuloj de Dio, t.e. ilin korfavoris la bonfaranta Plejaltulo. Ludante per la vorto, oni povas diri, ke graco estas

beno aŭ donaco kiu donas ‘ĉarmon’ al la vivo kaj invitas al danko. Graco kaj gloro, favoro kaj honoro estas kiel ĝemeloj, ekzemple en Psalmo 84:11. Kiam la anĝelo Gabrielo faris viziton al Maria (Luk. 1:28), li ĉarme kaj varme salutis ŝin jene: „Saluton al vi, la grace favorita”. Kial ŝi estas graco-plena? Nu, la teksto klarigas: „La Eternulo estas kun vi”. Maria ne timu, ĉar ŝi trovis gracon antaŭ Dio (Luk. 1:28–30). Kompreneble ankaŭ ŝia filo Jesuo estis „plena de graco (...)” (Joh. 1:14); „la graco de Dio estis sur Li” (Luk. 2:40) kaj li ade progresis en graco ĉe Dio kaj homoj (Luk. 2:52). Se vi sekvas vian konkordancon kaj serĉas ĉiujn lokojn, vi surprizige kaj ĝojige rimarkos ke en la kunteksto ofte ĉeestas la Sankta Spirito, la plej granda dono elĉiela (Komparu en VENI, CREATOR SPIRITUS: *Donum Dei altissimi* — donaco de la Plejaltulo — kaj „Tu septiformis *munere*” — sepopa Vi trezor’ de grac’.

Vidu *Adoru* n-ro 346. La vorto *MUNUS* ĉi-terene estas tre grava!).

Kio estas la sana doktrino pri graco? Tiun esprimon ni aŭdas en la mallonga letero de Sankta Paŭlo, servisto de Dio kaj apostolo de Jesuo Kristo, al episkopo Tito. Kial ne preni ĉi tiun triĉapitran sed juvelan epistolon por priparoli ĉi tie? La kadro de la letero estas GRACO. Aŭdu la komencan saluton: „Graco kaj paco de Dio, la Patro, kaj de Kristo Jesuo, nia Savanto”. Kaj Paŭlo finas jene: „Graco estu kun vi ĉiu!”.

Unualoke ni rimarkigu, ke ĉi tiu letero sunklare instruas la diecon de Jesuo Kristo. Ni tuj renkontos tiun lokon. Trifoje li nomas Dion Savanto kaj trifoje ankaŭ Jesuon. Trifoje estas parolo pri apero, malsupreniĝo, malkaŝo aŭ, laŭ la originalo: **epifanio!** Oni povas konkludi ke la centra temo estas la epifanio, t.e. la manifestiĝo de Dio inter homoj kiel kunhomo kaj redemptoro (liberi-

ganto). Dio, diras Paŭlo, „ĝustatempe **epifanie** manifestis Sian vorton en la predikado, kiu estas al mi konfidita, konforme al la ordono de Dio, nia Savanto”. (1:3). En la komenco Paŭlo parolas pri „espero al eterna vivo” (1:2), kaj poste pri homoj „atendantaj la feliĉan esperon kaj la epifanion de la gloro de nia granda Dio kaj Savanto, Jesuo Kristo” (2:13). „Aperis **epifanie** la graco de Dio” (2:11). Kaj kvazaŭ por ekzegeziti tiun gravan lokon, Paŭlo skribos poste (3:4) pri la **epifanio** de la boneco de Dio, nia Savanto, kaj Lia amo al homoj (filantropio)... En tiu sama kunteksto li instruas, ke ni estas justigitaj per Lia graco, por ke ni fariĝu heredantoj laŭ la espero de eterna vivo (3:7). Ni atentu tiun **esperon**, kiun la apostolo trifoje tuŝas!

Mi menciuj ankaŭ aliajn gravajn kernvortojn en ĉi tiu letero: amo, bonfaroj, boneco, fervoro, (komuna) fido, fideleco, gloro, instruado, justeco, mildeco, paco, pacienco, pieco, promeso, prudenteco, renaskiĝo, renovigo, Sankta Spirito, sankteco, savo, seriozeco, sincereco, sobereco, k.a.

Paŭlo havas la grandan bezonon instrui episkopon Tito per la sana doktrino. Li prikskribas la kvalitojn, kiujn ekleziaj gvidantoj, episkopoj kaj presbiteroj, nepre posedu. Kaj tiuj respondeculoj bone eduku kaj instruu homojn diversaĝajn.

Ni reiru al la epifanio, ĉar JAM aperis, malfermiĝis, manifestiĝis, eklumiĝis la Graco de Dio (2:11); unuafoje Dio konigis la naskiĝon de Sia filo en Betleemo, kulmina festo ĉiujara por ĉiuj kristanoj. Ni demandu al ni, kion celas la Graco de Dio. Laŭ la epistolo al Tito ni povas distingi inter graco sanktiganta (justiganta), instruanta kaj savanta.

GRACO SANKTIGANTA. Dio mem estas la Plejaltulo, kaj kion Li deziras pli ol tio, ke Lia popolo estu unu, unika kaj sank-

ta. Multaj lokoj en la Biblio atestas tion. Kiel Dio estas sankta, 'La Tute Alia', 'La Ĉiel Aparta', tiel ankaŭ homoj estu sanktaj, fariĝu justaj. Paŭlo ĉi tie karakterizas tiun popolon de justuloj kiel Dian posedaĵon, „propran al Dio, specialan, apartigitan, fervoran pri bonaj faroj” (2:14). Tiun popolon Jesuo Kristo 'purigis al si; Li donis sin por ĝi kaj savis ĝin per renaskiĝa lavado de la bapto kaj per renoviga inspiro de la Sankta Spirito. Precipe episkopo estu sankta (1:7).

GRACO INSTRUANTA. La epifanio de la graco de Dio estas direktita al instruado kaj lernado. Lasi malbonon kaj fari la bonon. La favoroj de Dio invitas unualoke al mallernado, al forigado, laŭ Paulo. Kion ni devas forigi? Li mencias: malpiecon; ĝi estas la homa sinteno nei ke Dio estas amanta Patro, ke Jesuo Kristo estas la savanta Filo kaj ke la Sankta Spirito nin per graco justigas, sanktigas, instruas, vekas kaj vokas kaj inspiras al bonaj faroj, al vivado laŭ la sana doktrino, al boneco kaj homamo. Due ni devas forigi laŭmondajn dezirojn. Temas pri deziroj kiuj malhelpas la finfinan venon kaj venkon de la Dia Regno, kiu aspektos kiel paradiza ĝardeno, en kiu homoj vivas kiel Diinfanoj, gefratoj dolĉanimaj kaj mildaj (3:2). Kaj kion ni devos lerni? Kion instruas al ni la Graco de Dio? „Vivi sobre, juste kaj pie en la nuna mondotempo”. Vivu en harmonio kun vi mem, ne transirante limojn kaj mezurojn. Vivu en harmonio kun via proksimulo, farante tion kion vi volas ke aliaj faru al vi. Kaj vivu en harmonio kun Dio, kiu sanktigas, instruas kaj savas por eterna vivo, kiun ni esperas.

GRACO SAVANTA. La tuta letero de Paŭlo al episkopo Tito temas pri la savlaboro de Dio en Jesuo Kristo. Jam aperis epifanie la graco de Dio, portante savon al ĉiuj homoj. Mi jam rimarkigis, ke la letero trifoje instruas, ke Dio estas nia Savanto (1:3;

2:10; 3:4). Kaj kiel Li savis nin? „Per kompato Li savis nin” (3:5). Kaj same Jesuo Kristo estas nia Savanto. Ankaŭ tion ni trifoje legas en lia epistolo (1:4; 2:13; 3:6). Paŭlo priskribas la vojon de konvertiĝo: homoj forlasu tion kion ili antaŭe faris: paroli malbonon, esti malpacemaj kaj malobeemaj, kondukti malsaĝe kaj erare, servi al diversaj pasioj kaj voluptoj, vivi en malico kaj envio, malami unu la alian (3:3). Kaj vidu: Dio malkaŝis sin, malfermis la ĉielon, realigis epifanion de graco, boneco kaj homamo.

Kaj kio estas la signifo de tiu graco? Se ni, kiel Maria, estos gracoplenaj, ĉu ni tiam povos trankvile ripozi kaj pasivi, ĝojante pri niaj privilegioj kaj feliĉo? Tute ne. Samkiel homoj estas benitaj por esti beno por la proksimulo, tiel ili ankaŭ estas 'justigitaj per Dia graco' (3:7) por fariĝi per sia vivpraktiko grac-alportantoj al aliaj, savante kaj liberigante siajn kunhomojn. Neniel kaj neniam ni estu homoj 'por ĉiu bona faro senvaloraj' (1:16), sed male: ni montru nin ekzemplo de bonaj faroj (2:7), fervoru pri bonaj faroj (2:14) kaj pretaj por ĉiu bona laboro (3:1), zorgu pri bonaj faroj (3:8), lernu daŭrigi bonajn laborojn, por necesaj bezonoj, por ke ni ne estu senfruktaj (3:14).

Kial Paŭlo tiom multe parolas pri 'bonaj faroj', dum ni kredas ke 'sola gratia' sufiĉas? Ĉu ni do devas esti kiel arbo donanta fruktojn? Jes! Ĉu ne sufiĉas ke bonaj laboroj havu siajn meritojn por la tero? Ili ne validas kiel pasporto kiu postvive malfermos al ni la ĉielon. Se mi bone komprenas la apostolon, li instruas ke niaj bonaj faroj, nia biblie inspirita vivpraktiko, kontribuos al la gloro, pri kiu li parolas tiel emfaze, predikante la celon kaj efikon de la epifanio de la Dia graco: ĝi instruas nin „atendi la feliĉan esperon kaj la epifanion de la gloro de nia granda Dio kaj Savanto, Jesuo Kristo”. (2:13). Ĉu ne grandioze, ke fruktoj de homoj povas klare

kaj brile reliefigi tiun gloron?

Ni bone atentu, ke Paŭlo direktas sin al Tito, kiun li nomas 'mia vera filo laŭ komuna kredo'. La kredo komunigas, unuigas homojn, faras ilin komunumo. Tiun unuecon tre minacas kaj atakas tiuj instruistoj kiuj ne sekvas la sanan doktrinon. Ni nepre komprenu, ke la komuna kredo estas donaco, graco, beno. Latine, ni jam lernis la vorton, ĝi estas 'munus', t.e. tasko kaj donaco, devo kaj dono, komisio, misio kaj ofico. La **ko** de la adjektivo **komuna** signifas: kun; ĝi indikas reciprokecon. Ĝi estas kiel ligilo inter homoj. Homoj konsekvence estas gekunuloj, ili estas donitaj unu al la alia kiel donaco kaj tasko. Se ni danke akceptas tiun donacon kaj konsciencie plenumas tiun taskon, ni estas homoj kiuj faras bonajn farojn. Tiam ni estas inter ni beno kaj graco. Kio estas pli bela ol havi komunan fidon? Tio estas la celo de la ekumena movado, al kiu kontribuu margene ankaŭ nia modesta konferenco.

Ĉu ne estas granda graco ke ni, kristanoj el pluraj tradicioj, sub la sama tegmento renkontas unu la alian kiel gefratoj survoje al komuna fido? Paŭlo nomas ĝin 'la fido de la elektitoj de Dio' (1:1). Ĉion ni dankas al la epifanio, al tio, ke Dio malfermis la ĉielon kaj sendis al ni Savanton, el kies „plenececo” — laŭ Johano en sia prologo — „ni ĉiuj ricevis, kaj gracon post graco”. — „Ĉar la unua vivinstruo estis donita per Moseo ('munus'); la graco kaj la vero estiĝis per Jesuo Kristo”. Ĉu ne sufiĉas nia respondo, nia jeso, kiel vorto de danko? *Gratias agamus Domino Deo nostro*. Danko estas la plej bela 'bona faro', kiun povas montri la homo. La respondo al sola graco estas sola danko. Bonaj faroj donas koron kaj kapon, okulojn kaj orelojn, manojn kaj piedojn, al gracoplena Dio, homiĝinta en Jesuo kaj homiĝonta ankaŭ en ni, kiuj aŭdas 'vortojn de graco'

(Luk. 4:22), inspiritajn de la Sankta Spirito, kaj estas vokataj agadi laŭe.

Jes, 'via graco al mi plene sufiĉas!' Sed la 'sola gratia' ne estas destinita por stoki kiel trezoron—por—mi—sola en mian koron sed por dividi kaj tiel kreskigi fruktojn. Paradoxo de la ĉiela aritmetiko: dividu por multobligi!

Jacques TUINDER

La graco de Dio

Se rekte la vojo iras,
kelkfoje ni certe diras:
Estas la graco de Dio.

Sed se mallumas la vojo,
verŝajne mi diras sen ĝojo:
Kie — la graco de Dio?

Se korp' kaj animo doloras,
kaj min neniu honoras;
mi petas pri graco de Dio.

Se daŭras la tagoj pezaj,
subite la pensoj progresaj:
— Ripozu en graco de Dio!

Kiam min trafas la morto,
estas al mi la forto
nur resti en graco de Dio.

Anna LANDFORS

Poemo pri graco prelegita dum matenpreĝo.

2 KORINTANOJ 12:1-10

Karaj gefratoj en Kristo,

En ĉi tiu dua epistolo al la Korintanoj, Paŭlo havis aferojn por diri al la Korintanoj, kompreneble, se ne, li ne skribus. La samo validis ankaŭ por la unua epistolo, kiam li denunciis la skismojn kaj la malordon. Kaj en ambaŭ epistoloj, li klare indikis al la legantoj, kiel li skribas al ili, kaj kiel ne. Ili devas aŭskulti, kion li diras al ili, ne ĉar li estas Paŭlo, aŭ ĉar Paŭlo havus iun specialan meriton aŭ forton, sed ili devas aŭskulti la vortojn de Paŭlo pro Kristo. Paŭlo ĉiam diras tie, ke li ne parolas de propra aŭtoritato, sed pro tiu de Kristo, helpe de la Sankta Spirito.

Kvankam Paŭlo estas Paŭlo, malgraŭ lia persona historio, malgraŭ la travivaĵoj, kiujn li travivis, li ĉiam rifuzas fanfaroni. li ne volas veni kun belaj vortoj. Li ne volas prezenti sin mem. Li volas prezenti Kriston. Li volas paroli la mesaĝon de la Evangelio. Certe, li povus fieri pro tio, kion li faris, pro tio, kio li estis. Li ĉiam ĉie diras, ke Kristo gravas, ke Kristo estas konsolo, fido, glo-ro. Kaj certe ne Paŭlo.

Kaj krome, en si mem, li diras, ke efektive li ne povas fanfaroni, ĉar li mem estas malforta. li dependas de Dio, de la Spirito. Li eĉ aludas al iu dornego, kiu kontuzas lin. Oni ne scias pri kio temas. Sed tio estas al li tiel grava, ke ĝi superas la viziojn, kiujn li havis, kaj kiujn li povus uzi kiel valorigilo, por demonstri ke li estas iu grava, al kiu Dio montris nerakontebajn belajojn. Li diras ke tiu

dornego estis donita de Satano.

Vi certe ĉiuj konas tiun alian nomon de Satano: la mensogisto. Li estas tiu, kiu ĉiam mensogas, kiu enmetas dubon pri la vortoj de Dio. Ĉu vi vere aŭdis lian voĉon, kiu diras: „Tion vi ne povas, rigardu vin mem”, aŭ: „Tion fari, Dio ne permesos al vi”. Aŭ, eble inverse: „Rigardu kiel bonkvalita vi estas, kaj la aliaj ne vidas tion”.

Ĉio el ĉi tio estas mensogo, ĉar validas nur kiel Dio rigardas nin, kaj Li rigardas nin tra Kristo. Se Dio transdonas al ni ion por diri, por fari, li donas ankaŭ la forton tion fari, kaj la kapablon. Kaj ankaŭ Dio certigas al ni lian gracon, lian pardonon.

Fakte, kaj tio videblas en ĉi tiu teksto, kiam temas pri forteco, Paŭlo ĉiam parolas pri la forto de Kristo, kiam temas pri agado, ĉiam temas pri la agado de la Spirito. La potenco estas tiu de Kristo, ne tiu de Paŭlo. La forteco de kristano, de kredanto, ne troviĝas en li mem, nek en tio, kion li povas aŭ povus fari, sed ĝi troviĝas en Kristo, en Dio, en la helpo de la Spirito.

Pro tio, la centra mesaĝo de tiu teksto diras: *Mia graco sufiĉas por vi*. Kial vi serĉus aliloke, kio jam estas donita al vi? Kial vi povus pensi ke tiu dornego kontuza malhelpus vin?

Sed antaŭ ol aŭdi de la Sinjoro tiun ĉi parolon, li petis trifoje, ke tiu ĉi dornego estu for. Kaj li ricevis tiun respondon. Ne nur unufoje, sed trifoje, li tion petis. Eble Dio ne bone aŭdis, aŭ eb-

le ne bone komprenis tion, kion Paŭlo diris. Sed fakte, tiu, kiu ne komprenis estis Paŭlo.

Kiom da fojoj, ni persone ne turnis nin al la Sinjoro por diri: „tiun problemon, tiun emon, tiun situacion, vi ŝanĝu, vi forigu”. Kaj, ĉu Li tuj respondis, agis? Certe ne ĉiam. Kaj, ĉu tiam same, ni ne denove plendis al li?

Ni estas ĉisemajne ĉi tie eta kongreso, kelkdeko da homoj, kiuj kune venis por kunvivado, kunadoro, kunlaboro.

Kaj ankaŭ, ni sentas nin tiel malfortaj. Ni pensas foje, ke la tuton ni devus lasi. Ĉu kun tia malforteco daŭrigi eblas? Ni tre ofte rigardas nin mem, tra la okuloj de tiu, kiu vidas malbone, de la pesimisto; Ĉu la pesimisto diras la veron, aŭ ĉu li estas la mensogisto? Kaj ankaŭ kiom da fojoj, ni petis de la Sinjoro: „Ni bezonas fortojn”, „ni ne bone agas”, „ni bezonas plibonigon tujan, forigon de la problemoj”. Kaj fakte, kion do Li respondas al ni: *Mia graco sufiĉas al vi, Via forteco fortiĝas en la malforteco*.

Eble do vi estas malfortaj, eble vi aspektas malfortaj, sed tio ne validas; Aŭ tio validas, ĉar tiam, mia forto faras ion, mia forto agas, kaj certe ne via forto.

Certe KELI ne multnombras. Certe KELI ne riĉas. Sed ni ne devas forgesi tiun ĉi versiklon: *Ne timu, eta grego*.

Mi volas rememoigi al vi tiun ĉi versiklon de la 127a psalmo: *Se la Eternulo ne konstruas la domon, tiam vane laboras super ĝi ĝiaj konstruantoj*.

Vi aliĝis al tiu movado, al tiu celo de internacia kunfrateco en Kristo. kaj fakte, tio signifas ke vi certe kredas, ke tio estas ankaŭ domo konstruita de Dio. Niaj pioniroj kredis, kaj tiu kredo estis ilia motoro. Tiel ili ricevis de Dio la fortojn agi. Ili kredis, ke la konstruanto

de tiu nia komuna afero estas Dio. Ke Dio estas tiu, kiu provizas. Ke en Dio, la afero eblas.

Mi volas ankoraŭ citi alian eron el la sama epistolo al la Korintanoj, en la unua ĉapitro: *Ni ne fidu nin mem, sed Dion*.

La konstruanto de nia afero, same kiel la konstruanto de nia vivo, estas Dio mem. Ni vivas kaj agas per Lia forteco, ne per nia. Lia graco sufiĉas, la ceteron ni ricevu de Li.

Ĉu tio signifas, ke ni nenion devas fari? Certe ne. Ĉu tio signifas, ke ni ne devas esplori por trovi kompetentulj? Certe ne. Ĉu tio signifas, ke ni ne devas librotenadi? Certe ne.

Sed en ĉio, ni devas vivi per tiu frazo: *mia graco sufiĉas por vi*.

Amen.

Philippe COUSSON

SE PLAĈUS AL LA DIA GRACO...

Saĝa homo venigis tajloron kun la peto fari por li novan pantalonon. Farinte mezuradon, la tajloro promesis pretigi ĝin, se plaĉus al la Dia Graco, en malpli ol septaga tempospaco.

Pasis semajno. Kaj sekve la servisto de la saĝulo veturis al la tajloro por preni la pantalonon. Sed diris la tajloro: „Okazis, ho ve, malgranda prokrasto. Sed, se plaĉus al la Dia Graco, morgaŭ la pantalonon nepre estos preta”.

Tagon poste la tajloro sin denove senkulpigis, dirante: „Mi bedaŭras, ke la pantalonon ankoraŭ ne estas finkudrita. Revenu morgaŭ kaj, se plaĉus al la Dia Graco, ĝi tiam certe estos en via

Karaj gefratoj,

Ni kongresas en la regiono de mia junaĝo. Mi rememoras, kiomfoje mi ascendis sur la monton Hostýn. Mi devenas el katolika familio. La monto estis por ni sankta, la preĝejo estis sankta, konsekrita al la Virgulino Maria. Ni alveturadis trajne al Bystřice pod Hostýnem, kaj poste piede supren. La aŭtobusoj ankoraŭ ne veturadis tien. Speciala pilgrimo estis en la novjara nokto. Ne estis facile. La lasta trajno alverturis vespere. Oni devis supreniri en la frosto kaj neĝo, kaj resti en la malvarma preĝejo la tutan nokton. ne estis gastejoj supre. La unua matena trajno forveturis de la stacidomo en Bystřice pod Hostýnem je la kvina horo. Sed tamen, dum la noktomeza novjara meso la preĝejo estis plene ŝtopita. Estis tio eĉ iu protesto kontraŭ la kontraŭreligia komunisma premo. Sed la preĝejo estas plenplena ankaŭ en ĉi tiu libera tempo. Estas maniero de devoto.

La pasintan dimanĉon mi post multaj jaroj denove vizitis la supron de la monto Hostýn. Post unuhora supreniro mi estis tie je la sesa matene. Mi sekvis la spurojn de mia junaĝo. Tiujn mi trovis, sed ĉu mi trovis ankaŭ Marian? Mi vidis devotecon, al kiu algluiĝas multaj supraĵoj. Denove mi renkontas la eks-



posedo”.

Pasis denove tago, kaj post iom da pensado la saĝulo sufloris al sia servisto: „Se ĝi denove ne estos preta, demandu al li, kiom longe daŭrus, se lia laboro ne plaĉus al la Dia Graco”

Prilaboris: Jacques TUINDER

tremojn pri tiuj estis tie parolite de alia vidpunkto: unuj bezonas piecon kun Maria preskaŭ materiale — kun sanktaj bildoj kaj diversaj devotaĵoj, la aliaj pri Maria eĉ ne parolas.

Kion por mi signifas la biblia Maria?

Luko simple atestas, kion Maria diris. Kaj kion ŝi diris, estas miriga laŭdkanto. Jam duan fojon Dio ŝin surprizis. Unue ŝi estis alparolita de la anĝelo: *Saluton al vi, la grace favorita, la Eternulo estas kun vi.* Poste ni aŭdas Elizabeton: *Benata vi estas inter virinoj, kaj benata estas la frukto de via ventro.* Sub la influo de tio ĉio Maria laŭdas Dion. Ne ŝi estas granda kaj grava, sed Dio: *Mia animo altigas la Eternulon.* Ŝi restas humila kaj ĝis nuna tempo preskaŭ ne videbla por la okuloj. En la humileco ŝi povas diri: *De nun ĉiuj generacioj nomos min feliĉa.* Predikisto de evangelika eklezio aldonas: *Jes ĉiuj generacioj nomos ŝin feliĉa, krom evangelikoj.*

Al la graco apartenas danko. Ĉu ni scipovas esprimi dankon ankaŭ por la vivo de Maria, por ŝia jeso: *estu al mi laŭ via diro;* por ĉiaj paŝoj de fido?

Jes la paŝoj de la fido. Pri tio ni ankaŭ ĉi tie aŭdis. La graco postulas, invitas al plua paŝo. Maria aŭdas anĝelon, kaj samtempe ekscias pri la de Elizabeta atendata infano. Kaj Maria iras. Tial ŝi aŭdas novan pluan Dian vorton pere de Elizabeta. Tial sekvas ŝia laŭdkanto.

Ĉu ni jam komprenas, kial ni ne estas ankaŭ gracoplenaj? Kial ne elfluas el niaj lipoj laŭdkanto al Dio? Ni ne akceptas la tutecon de lia graco. Kiam ĝi venas, niaj paŝoj ne sekvas ĝin, kaj la floro de dankesprimo kaj laŭdkanto ne povas elkreski.

Ĉu ni jam kun Maria iomete travivis

VALDANOJ

Karaj Gefratoj,

Mi pensas, ke Vi ĉiuj lernis siatempe en la kadro de la eklezio-historio pri la movado de Valdanoj, sed por enkonduko mi tamen memorigas Vin iom pri ilia historio. Estus interese esplori la kaŭzon kial en inter la montaraj de suda Francio jam de frua mezepoko ni trovas spurojn de tiaj religiaj movadoj, kiuj montras ke la tieaj homoj deziris pli profunde ekkoni la esencon de kristanismo. Ni scias pri tio, ke estis sekretaj societoj, kiuj klopodis en la propra lingvo ekkoni minimume partojn de la Biblio. Ties daŭrigon ni povas malkovri en la movado, kiu fondiĝis ĉirkaŭ Petro VALDO, en la 12a jarcento. Li mem estis riĉa komercisto de Liono,



la fortecon de la Dia brako, la malaltigon de la potenculoj, la falon de iliaj tronoj, la altigadon de la humiluloj? Ĉu ni jam akceptis, ke ni apartenas al Abraham, kiun Dio amis? Ke dank' al la Jesua morto ni estiĝis lia idaro, unu nova gento de la tuta mondo, ke jam plenumiĝas la Diaj promesoj rilate al Izrael kaj rilate al ni, popolo el paganoj.

Ĉu ni povas ne danki ĉiutage, pro tiom da favoro, gracoj, donacoj?

Mi sukcesis diri nur iomete, kion signifas por mi Maria. Dio parolas pri ŝi multe pli, kaj se ni sekvas la Dian Vorton, Li malfermos al ni la plenecon de sia Vorto.

Václav POSPÍŠIL

kiu sentis internan maltrankvilon, kies solvon li volis serĉi en la Biblio. Tial li petis iun konatan pastron, ke li traduku por li la Novan Testamenton en la francan lingvon. La legado de la Sankta Skribo vere tiel ŝokis lin, ke lia tuta vivo transformiĝis. Li disdonadis sian havaĵon inter la malriĉuloj, kaj li mem komencis disvastigi la Bonan Novajon, la instruojn de la Biblio. Tiu lia agado konsternigis la katolikan estraron, unue la episkopo de Liono malpermesis al li la predikadon, poste la sinodo de Laterano jam deklaris ilin herezuloj. Tiu-tempe ilia efiko jam estis spertebla inter la popolo, multaj komprenis kaj akceptis ilian mesaĝon. Petro Valdo devis rifuĝi kaj li mortis en la fino de la 12a jarcento en Ĉeĥio. Sed liaj disĉiploj restis en suda Francio, kaj ili jam tiel forte, eĉ perforte reprezentis siajn tezojn, ke la papo (Innocento la 3a), komencis krucmiliton kontraŭ la valdanoj en 1209. Nome iliaj du ĉefaj tezoj estis:

a) la reputacio de la Biblio kontraŭ la reputacio de la papo

b) anstataŭ la potenco de la pastroj, la principo de la universaleco de la pastreco.

La dudekjara detrua militiro kaj poste la funkciigo de la inkvizicio tute ne niigis la opozicion kontraŭ la papo. Restis nur la malgranda, pacema, evangelia parto de la valdanoj, kiuj retiriĝis en Savojo (en suda Francio). Kompreneble kun granda ĝojo ili salutis la Reformacion, kies svisa, kalvinana formo estis plej proksime al ili.

Denove ekflamis la persekutado kon-

traŭ ili dum la regado de Ludoviko la 14a. Fine, ili devis forlasi sian patrujon kaj rifuĝi en svisajn, germanajn kaj norditaliajn teritoriojn. Nur en la kadro de ĝenerala religia libereco ili ekhavis la rajton kiel religio funkcii en sia patrolando. Nuntempe ili havas komunumojn ankaŭ en tuta Italio.

Pri la misia agado de la valdanoj:

El inter la popoloj de Eŭropo la valdanoj faris unue nacilingvan Biblian tradukon. Kelkajn jarcentojn antaŭ la Reformacio ili jam uzis nacilingvaj, manskribitajn Bibliojn. Ekzistis malmultaj tiaj kopioj, tial homoj diligente ellernis partojn de la Biblio. Ofte ili sciis la Evangeliojn de Mateo kaj Johano, eĉ kelkajn epistolojn parkere. Senlace kaj pacience ili kopiis de ĉapitro al ĉapitro la Sanktan Skribon ofte en Alpaj grotoj. La valdanaj predikantoj estis misiistoj. Duope ili ekiris, kiel Jesuo sendis siaj disĉiplojn. Ili vagadis kiel komercistoj, kolportistoj, kaj se ili havis okazon, tiam ili montris al siaj klientoj partojn el la Biblio kion ili ĉiam kunportis. Ilia sinofera entuziasmo ne konis obstaklojn. Ili vagadis tra arbaroj kaj altaj montoj por transdoni sian mesaĝon. Baldaŭ en tuta okcidenta-, suda- kaj mez-Eŭropo fondiĝis valdanaj komunumoj. En siaj etiko kaj vivmaniero ili estis alte super la ĝenerala nivelo de la epoko.

Je iniciato de la valdanoj okazis sista komuna konferenco kun la francaj-svisaj estroj de la Reformacio en 1532 en Chamforans. Tie oni decidis, ke surbaze de la manskribitaj, valdanaj Biblio-tradukoj estu eldonita la unua tuta Biblio franclingva. Pierre Robert OLIVETAN, la renoma svisa reformatoro vojaĝis al la valoj de valdanoj, kaj

tie li korektis kaj ordigis la manuskriptojn por presejo. La koston de la eldono, 1500 orajn talerojn la valdanoj kovris en 1535. Oni povas diri, ke la unua franclingva Biblio estis donaco de la valdanoj por la Reformacio.

Bedaŭrinde iliaj suferoj ankoraŭ ne finiĝis. La princo de Savojo al kiu apartenis ankaŭ la valoj de valdanoj, devigis ilin en Januaro 1655 dum du semajnoj aŭ fariĝi romkatolikoj, aŭ forlasi siajn hejmojn. Ĉar tio ne eblis en la malvarma vintro, poste aperis 15000 solduloj inundante iliajn vilaĝojn, kaj faris teruran sangoverŝadon. Tiu ĉi masakro ŝokis ankaŭ la konatan anglan poeton John MILTON, kiu pri tio verkis sian poemon por vekti la konsciencon de la Eŭropaj popoloj.

Lastan jaron, dum la Ekumena Kongreso en Rimini mi renkontis unuan fondon valdanojn, kiam protestantoj partoprenis en la Esperantlingva Diservo en malgranda valdana preĝejo. Ankaŭ en la ekskurso en Ravenna unu el la gvidantoj estis la juna valdana pastro. De li mi eksciis, ke ankaŭ en Venecio troviĝas valdana komunumo kaj preĝejo. En la printempa semestro mi studis kun stipendio en Venecio. Tie mi vizitis valdanajn Diservojn, kaj interamikiĝis kun la membroj. Tiel mi povas raporti al Vi kiaj estas nun la Diservoj ĉe la valdanoj:

Mi, kiel hungara kalvinisto sentis min hejmece inter ili. Dum la Diservo ili kantas pli ofte ol ni. La alia diferenco estas, ke ili ĉiufoje diras la konfesion de pekoj, akceptas la pardonon, kaj diras la kredkonfesion. Sed, similas al nia Diservo, la centra parto estas la Biblio-legado kaj la prediko. Mi multe ĝuis tion, ke la predikisto parolis tute aktuale pri te-

IKUE-KELI ĉe la Universala Kongreso Pekino

Pastro Bernard eichkorn skribas...

La kristanaj partoj de la kongresa programo evoluis jen:



moj, problemoj, artikoloj aŭ libroj, kiuj okupas la homojn de la komunumo. En mia hejmo mi al kutimiĝis al tiaj modernaj kaj aktualaj predikoj. La venecia komunumo posedas belegan, antikvan palacon, kiu entenas ankaŭ malmultekostan tranoktejon, kie, dum la festotagoj estas ankaŭ multaj eksterlandaj gastoj. Do, ekzemple en Pasko, kiam mi partoprenis la Diservon, mi vidis, ke la predikisto ĉiujn siajn itallingvaj frazojn mem tradukis anglan.

Ili havas teologian seminarion kie predikistoj prepariĝas por la servoj, sed laŭ mia scio ankaŭ laikuloj povas kaj kutimas paroli pri la Biblio. Inter miaj broŝuroj Vi povas vidi, ke ili frate kunlaboras kun metodistoj kaj baptistoj de Italio. De 1979 la italaj valdanoj kaj metodistoj akceptis aparteni al unu Sinodo. Sur alia malgranda mapo Vi vidas la ĉirkaŭaĵon de Venecio kie estas signitaj la lokoj de komunumoj kaj la tempoj de la diservoj de la tri denominacioj: baptistoj, metodistoj kaj valdanoj.

En la universitato nature mi aŭskultis la prelegojn en itala lingvo, tiel same la predikojn mi sufiĉe bone komprenis en tiu lingvo. Mi pensas, ke en tio multe helpis al mi ke kiel infano mi jam partoprenis KELI-kongresojn, kaj mi aŭdis Vin ĉiujn paroli ankaŭ kun mi en nia Esperanto.

SOMHEGY Zoltan

La Ekumena Diservo, preparita de pastro KRONENBERGER sur kvar folioj kopiitaj en 100 ekzempleroj, bone okazis dimanĉe por la partoprenantaro. Komence mi provis kantigi ilin, sed finfine mi bone kantis kaj ili bone aŭskultis. Mi predikis pri nia danko, por kio dum la kongreso estis multaj okazoj. Post dek-minuta paŭzo mi celebris por dekduo da restantoj la katolikan dimanĉan meson kiel eŭkaristio, kio ja en la greka lingvo signifas celebrado de danko.

Ĵaŭde partoprenis kvardeko da kongresanoj la IKUE-KELI-kunvenon. Post kanto kaj diversaj salutaj vortoj Flory WITDOBECK prezentis la venontpaskan kunvenon en Boulogne sur Mer, en kiu oni festos la 100-jariĝon de la unua Universala Esperanto-Kongreso, inter alie okazos komuna dimanĉa meso kun la katolikoj de Boulogne sur Mer. Giovanni DAMINELLI invitis al la venonta ekumena kongreso en Hungario.

Partoprenanto faris edifajn kontribuojn, mi prezentis la libron *Adoru* kaj disdonis diversajn informiloj, donis kelkajn informojn kaj respondojn kaj finis per kanto el *Adoru*.

En la oka numero de la *Kongresa Kuriero* mi aperigis informon pri tiuj okazintaĵoj.

Kun la helpo de ĉinaj esperantistoj en la daŭro de la kongreso mi sukcesis trovi du preĝejojn de la loka katolika eklezio, inter alie la ĉef-kirkon de la episkopo de Pekino. Tiu preĝejo estis fondita jam en la 17a jarcento de la itala jesuito RICCI. Dimanĉe post la UK mi vizitis tie sanktan meson festitan en la ĉina lingvo La preĝejo estis plenkuna kun ĉirkaŭ mil homoj, kiuj vigle festis la dimanĉon. La respondoj kaj kantoj de la komuno estis fortaj kaj ĝojaj. Multaj junaj homoj partoprenis ĉi tiun meson.

Korajn salutojn

Bernhard EICHKORN

La 8an de aŭgusto, 2004, okaze de la 36a Korea Kongreso de Esperanto en la urbo Iksan, Koreio.

Saluton, estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj! Estas al mi grandega ĝojo kaj honoro, ke mi havas la okazon prezenti al vi pri kristanismo en Esperanto.

Mi pensas, ke tiu ĉi simpozio estas aranĝita por atingi la celon de nia movado disvastigi Esperanton al la tuta homaro, enkondukante Esperanton en ĉiujn kampojn.

Ni kristanaro enkondukis Esperanton en la mondon de Kristanismo frue en la 1910-aj jaroj kun la celo disvastigi Esperanton en kristanisma mondo kaj Kristanismon en Esperantujo, kaj faris jenajn movadojn: fondi organizojn kiajn KELI, IMB kaj IKUE, eldono de esperanta Sankta Biblio, publikigo de organoj, Diservo en Esperanto, okazigo de kongresoj de kristanaj esperantistoj.

Unuavice, mi volas diri al vi pri Kristanismo. Verŝajne, multaj homoj pensas, ke ankaŭ Kristanismo estas religio nur por ricevi benon kaj por eniri en la ĉielregnon post morto. Sed ĉi tio estas simila al tio, kvazaŭ oni vidas nur la branĉojn, ne vidante la trunkon de la arbo.

Se mi diras al vi pri unu libro, kiu estas plej furora nuntempe en Esperantujo, mi povas prezenti al vi *'Vojaĝo en Esperanto-Lando'*, verkita de Boris KOLKER. Tiu ĉi libro estas konstan-

te vendata en multaj jaroj, kaj naskiĝis eĉ hejmpaĝo por tiu libro kaj en ĝi oni prezentas siajn postlegajn impresojn pri tiu libro kaj estas superflua la rekomendaj leteroj por legi ĝin.

En la enkonduka parto de la libro aperas la rusa vorto *'Perestroika'*. Ĉi tio estas la termino uzata por reformo kaj malfermo de Rusio. Rilate al *Perestroika*, KOLKER diris: „Kion ni reformu kaj malfermu? Vera *Perestroika* estas la movado por reakiri la originan figuron de Rusio”.

Jes, kredi kaj servi al Dio signifas ne nur preĝi por beno kaj por eniri en ĉielregnon, sed antaŭ ĉio reakiri la originajn figurojn de homoj. Ĉi tio estas la fundamenta dogmo kaj celo de Kristanismo.

De nun mi ŝatus diri al vi pri tiu ĉi problemo en kvin ŝtupoj.

1. Kia estis la homa origina figuro?
2. Kio instigis la homon perdi sian originan figuron kaj forlasi Dion?
3. Ĉu la Kristanismo povos vere savi la perversan homaron?
4. Kia lingvo estas Esperanto por Kristanismo, kaj kion Kristanismo povas fari por Esperanto-movado?
5. Kiuj organizoj do troviĝas en kristanisma mondo rilate al Esperanto, kaj kion ili faras?

1. Kia estis la homa origina figuro?

Laŭ la Sankta Biblio: *En la komenco Dio kreis la ĉielon kaj la teron*, kaj poste kreis ankaŭ homon. Homo estis kreita,

por ke li vivu ĝuante ĉian kreitaron en la ĝardeno Edeno sen malĝojo, doloro, morto, kaj disiĝo.

Ĉi tio estis la origina figuro de homo. Des pli grave estas, ke la Sankta Biblio estas *'la Vortoj de Dio'*, kaj *'la Vortoj de Eterna Vivo'*, kiuj plenumiĝos, antaŭ ol la ĉielo kaj la tero forpasos (Mateo 5:18).

2. Kio instigis la homon perdi sian originan figuron kaj forlasi Dion?

Peko instigis la homon forlasi de sia origina figuro kaj fariĝi perversa homo. Kio do estas la peko, ke homo forlasis de sia origina figuro kaj fariĝis perversa homo?

'Peko' estas *'hamartia'* en greka lingvo. Ĝi signifas, ke sago pafita ne trafas la celon kaj preterflugas ĝin. Kiel la devianta sago, peko signifas, ke homo vivas ne konforme al la Volo de Dio.

Dio diris: *Ne manĝu la fruktojn de la arbo, kiu estas en la mezo de la ĝardeno* (Genezo 3:3). Tiu Vorto estis la simbolo de la aŭtoritato de Dio kaj la *'sekreto'* teni la originan sanktan figuron de homo.

Sed, homo forgesis la Vorton de Dio, kaj estis logita de Satano, kiu diris, *Se vi manĝos la tabuan frukton, malfermiĝos viaj okuloj, vi fariĝos kiel Dio, kaj vi scios bonon kaj malbonon* (Genezo 3:4). Ĉi tio estis la unua peko, kiun homo faris.

Pekinte, homo ektimis Dion kaj evitis Lin. Kaj la pago de la peko estis malsano, doloro, morto, kaj envenis en la mondon *'malfeliĉo'*.

Post tio, homo estis forpelita de la ĝardeno Edeno kaj perdis sian originan figuron. Tiel envenis la *'prapeko'* en la mondon, kaj ĉiuj homaranoj naskiĝis

kun la prapeko, kaj devis vivi kaj morti kun ĝi.

En la unua kaj dua versikloj en la 59a ĉapitro de Jesaja en Malnova Testamento estas skribite: *Vidu, ne mallongiĝis la mano de la Eternulo, por ke ĝi ne povu helpi; kaj ne malakriĝis Lia orelo, por ke Li ne aŭdu. Nur viaj krimoj estis disigiloj inter vi kaj via Dio, kaj viaj pekoj kovris antaŭ vi Lian vizaĝon, por ke Li ne aŭdu.*

La peko de homo starigis muron inter homo kaj Dio, kaj devigis homon vivi sen komunikado kun Dio.

3. Ĉu Kristanismo povos vere savi la homaron perversan?

En la antikva tempo de Chosun-Dinastio en la korea historio estis la kutimo, ke riĉaj pekuloj aĉetis malriĉajn homojn kontraŭ mono, kaj igis ilin esti batitaj anstataŭ la riĉaj pekuloj. Kaj la pekuloj de la riĉuloj estis pardonitaj.

Sed, la pekuloj, kiujn homoj faris antaŭ Dio, ne estas pardoneblaj tiamaniere. Tio, kion iu ajn homo ne povas pardonpeti anstataŭe, estas la prapeko.

Kristanismo estas religio, kie Jesuo, la Filo de Dio, venis en la mondon en karno de homo, estis krucumita sur la kruco por elaçeti la pekulojn de ni ĉiuj, elverŝis tutan sangon en Sia korpo, post tri tagoj releviĝis, kaj donis al ni la *'esperon'* saviĝi el la potenco de morto, se iu ajn kredas al Li. La Vortoj de Sankta Biblio pruvas tion. Halejuja!

La Sankta Biblio ne estas skribaĵo, kiun homoj skribis laŭ siaj volo, sed *Ĉar neniam profetaĵo estas alportita per homa volo; sed homoj, movataj de la Sankta Spirito, parolis laŭ Dio*, kaj ĝi estas la grandega historia kroniko, kiun verkis 40 homoj dum 1 600 jaroj.

4. Kia lingvo estas Esperanto por Kristanismo, kaj kion Kristanismo povas fari por Esperanto-movado?

Esperanto estas la Internacia Lingvo, disvastiĝinta en pli ol cent civilizitaj landoj. Ĝi fariĝis la lingvo egala al ĉiuj, kiun ĉiuj povas uzi tute egale kaj sencermonie super nacioj kaj religioj.

Por plenumi la suverenan ordonon de Dio, t.e. disaŭdigi la evangelion ĝis la mondfino, ni bezonas la internacian lingvon, kiu estas egala al ĉiuj kaj facile lernebla por egala interparolado. En tiu senco Esperanto estas plej ideala lingvo por evangelizo.

En la hodiaŭa tago, la terĝlobo fariĝis nomata Monda Vilaĝo super landlimoj. Se ni volas, ni povas facile vojaĝi eksterlanden. Pro tio ni kristanoj planas eduki misiistojn, kiuj estas armitaj per Esperanto, kaj helpi ilin agadi por la evangelizo en fremdaj landoj.

Tiu ĉi klopodo utiligi Esperanton fare de kristanoj ebligas prezenti al la nesperantistaj kristanoj la noblan spiriton kaj utilecon de Esperanto, kaj certe helpas por fruiĝi la tagon atingi la 'finvenkisman', t.e. la tagon, kiam la tuta homaro uzos Esperanton.

5. Kiuj organizoj do troviĝas en kristanisma mondo rilate al Esperanto, kaj kion ili faras?

La organizoj, kiuj rilatas al Esperanto, estas KELI, IBM, kaj IKUE.

KELI estas la mallongigo de *Kristana Esperantista Ligo Internacia*.

KELI estis fondita en 1911 dum la 7a Universala Kongreso de Esperanto en Antverpeno. En ĝi kolektiĝis la kristanoj de diversaj tendencoj, ĉefe el eklezioj de la Reformacio.

Ĝia dumonata organo, *Dia Regno* ekaperis jam pli frue, en 1908, kaj nun ĝi servas kiel ligilo inter membroj kaj interesatoj en 48 landoj.

Grava estis de la komenco la havigo de baza literaturo. En 1912 aperis la Nova Testamento kaj en 1926 la Biblio kun la Malnova Testamento tradukita de Zamenhof — ne private, sed en la Brita kaj alilanda Biblia Societo.

Ili estas daŭre haveblaj en ĉiu Biblio-vendejo tra la tuta mondo.

De la jaro 1971 KELI posedas oficialan himnaron *Adoru Kantante* kun 262 kantoj plejparte klasikaj, el multaj landoj kaj lingvoj, kun kvarpartaj muziknotoj

Post la milito KELI komencis organizi ĉiujaran kongreson, kun bone ellaborita programo el laboro, studo, distro, konatiĝo kun la kongresa lando kaj kontaktoj al la lokaj eklezioj.

Pli kaj pli, pro bona kontakto al IKUE, la Rom-Katolika Esperanto-unuiĝo, la jaraj kongresoj okazas komune, do ekumene, unuafoje en 1968 en Limburg/Lahn. Ili allogis ĉ. 200 homojn, ne nepre membrojn de IKUE aŭ KELI:

Okaze de Universalaj Kongresoj, IKUE kaj KELI klopodas oferti Diservojn, se eble ekumene. Ofte ili estas inter la plej amase vizitataj programeroj de la kongresa semajno.

La tasko de KELI montras en du direktoj: informi pri Esperanto inter eklezioj aŭ kristanaj grupoj, kaj informi pri kristanismo en Esperantujo.

En Koreio la sekcio de KELI naskiĝis en la jaro 1970, kaj la membroj faras jenajn agadojn:

1. havi diservon, kiuj estas farataj en Esperanto.

2. traduki la libreton *'Kio estas Kri-*

stanismo?' (1988)

3. eldono de Nova Testamento Esperanto-Korea (2003)

4. eldono de *Pano Por Animo* (baldaŭ aperonta)

5. enkonduki Esperanton en preĝejojn kaj informi per iliaj hejmpaĝoj.

IBM estas la mallongigo de *Internacia Biblia Misio*, kaj la sidejoj de IBM estas en Aŭstralio kaj Britio, kaj agadas por evangelizi en la tuta Esperantujo disdonante la Sanktan Biblion en Esperanta versio.

IKUE estas mallongigo de *Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista*. Ĝi estis fondita en la jaro 1910, kaj nun havas ĉ. 1 300 katolikajn membrojn, kaj publikigas ĉiu-dumonate *'Esperon Katolikan'*.

IKUE estis fondita kun la celo, 'Evangelizado, eklezia unueco, homa interkompreno, frateco kaj paco, kaj Eku-menismo.

En Katolikismo la papoj ekde Pio X kaj multnombraj kardinaloj kaj episkopoj bonvenigis kaj subtenis la esperantan movadon. Kaj efektive en la 20a jarcento ĉiuj papoj montris ian favoron al la agado de katolikaj esperantistoj. Komence de la 30aj jaroj de la 20a jarcento sur la titolpaĝoj de *Espero Katolika* aperadis la noto:

„Honorita per apostola beno de Papo Pio X, 27 junio 1906, kaj de Papo Benedikto XV, 20 aŭgusto 1920, kaj de papo Pio XI, 11 oktobro 1924”.

Kaj en la majo, 2002, en Hamburg en Germanio, La forumo kun la titolo *'Esperanto, la nova latino por preĝejoj'*, kie partoprenis 50 000 katolikoj, kaj okazis la diskuto pri tio, ke la latino jam estas mortinta lingvo kaj ne estas taŭga por katolika komuna lingvo, kaj Espe-

ranto estas la plej taŭga alternativo.

Kaj la artikolo pri tiu ĉi forumo estis publikigita sur la unu plena paĝo de la fama usona tagjurnalo *USA Today*, kaj ĝi tiris grandan atenton de multaj homoj de la mondo.

Mi esperas, ke Esperanto estos amata ankaŭ en la mondo de religio kaj ludos gravan rolon por naski multajn esperantistajn kredantojn.

Jen mi finas mian prelegon, citante unu verson de Sankta Biblio:

Ĉar Dio tiel amis la mondon, ke Li donis Sian solenaskitan Filon, por ke ĉiu, kiu fidas al li, ne pereu, sed havu eternan vivon. (Johano 3:16)

Dankon por via aŭskulto!

Preleganto: MA Young-tae

18a INTERNACIA INTERRELIGIA KUNVENO

En Milano de la 5a ĝis la 7a de septembro, ĉijare okazis la 18a Internacia interreligia kunveno de preĝo por paco. La ĉijara temo estis: „Religioj kaj kulturoj: la kuraĝo de nova humanismo”. La organizanto estis la Komunumo de Sankta Egidio.

Dum la inaŭguro de la kunveno, en la teatro Arcimboldi en Milano, i.a. ĉeestantojn salutis Yasumi Hirose, prezidanto de Oomoto. Komence de sia salutparolado li diris. „Mi eldiras mian plej profundan respekton kaj dankon al ĉiuj, kiuj heredis la spiriton de Papo Johano Paŭlo la 2a, esprimitan okaze de la monda renkontiĝo por la paco okazinta en Asizo en 1986 kaj kiuj havante kuran celon, kune sindevigis kaj

daŭrigis laŭiri la vojon por la paco dum ĉiuj ĉi longaj jaroj.”

Kaj aldonis: „...la realigo de estonteco en kiu kunvivu diversaj popoloj, diversaj kulturoj kaj diversaj lingvoj eblas nur pere de la reciproka respekto kaj kompreno de alies kulturoj. Krome, por ke la homaro povu superi la muron de la lingvo kaj por ke ĉiuj fariĝu fratoj kaj fratinoj, mi opinias, ke estas grava la uzo, aldone al la propra lingvo, de Esperanto, ĝuste por pli bona kompreno”.

La laboro de la kunveno disvolviĝis en 36 forumoj kiujn aktive partoprenis altaj religiaj reprezentantoj de ĉiuj mondaj religioj kaj aktivaj laikoj, i.a. kelkaj nunaj kaj eksaj ŝtatestroj, diplomatoj, unu Nobelpremiito.

Ĉe la fino de la kunveno, kies laboro estis dividita en 36 forumoj, ĉ. 400 partoprenantoj procesie venis al la placo antaŭ la katedralo en Milano kie estis diskonigita la

ALVOKO POR LA PACO 2004

Ni, viroj kaj virinoj el diversaj religioj, el 60 landoj de la mondo, ariĝintaj en Milano por preĝe alvoki la grandan donacon de la paco eniris la profundon de niaj religiaj tradicioj, ni rigardis kun kompato al la vundoj de la mondo en kiu ni vivas de la popoloj kaj de la etuloj. Ni aŭskultis la preĝojn de la multaj kiuj petas tutmondigi la solidarecon, labori por estonteco vivebla ĉefe por la infanoj kaj la maljunuloj, por Eŭropo, Afriko, Mezoriento, Amerikoj, Azio, ĉiuj kontinentoj. Ni aŭskultis la preĝojn de tiuj kiuj petas ne morti pro aideso, pro malsato, pro soifo, pro milito, pro terorismo. Ni preĝis kaj ni malkovris ankoraŭfoje la neanstataŭigeblan forton de la preĝado.

Ŝajnas ke nia mondo forgesis, ke la homa vivo estas sankta. Sed Dio estas apud ĉiu viktimo de la perforto kaj deziras la malaperon de la perforto kiu posedas korojn kaj agojn. Dio kompatas tiun, kiu suferas la militon, tiun, kiu havas senesperigon. Dio mem hodiaŭ indikas novan vojon, kiun oni devas kuraĝe laŭiri.

La nomo de Dio estas paco. Kaj kiu uzas la sanktan nomon de Dio por beni la militon kaj terorismen, tiu malbenas ankaŭ la celon pro kiu oni batalas kaj oni malproksimiĝas el Dio.

Preĝado, aŭskulto, dialogo ankaŭ en ĉi tiuj tagoj de doloro por la mondo instruis al ni vidi pli malproksimen ol faras rezignacio kaj timo, kiuj hodiaŭ trairas la korojn de multaj.

El la profundo de niaj religiaj tradicioj ni komprenis des pli profunde kiel per la timo, la terorismo kaj la milito, la homa ĝenro riskas la memdetruon Per ili ĉiu homa estulo allasas sin al tiu malbono, kiun li volus kontraŭbatali.

Kiu uzas perforton tiu senkreditigas sian celon. Kiu opinias, ke nur pli granda perforto estas la respondo al truditaj maljustaĵoj tiu ne vidas la montojn da malamo, kiujn li kontribuas krei kaj kiuj pezas ankaŭ sur la generacioj de la gefiloj. Mondo sen milito kaj sen teroro eblas.

Hodiaŭ estas la tempo de la kuraĝo havi novan humanismon kiu helpas superregi la timon kaj kiu ebligas konstrui jam nun la mondon kiun ni bezonas. Tia kuraĝo estas nutrata de la kredo, la kredo estas la bazo laŭ sankta maniero de la valoro de la hompersono kaj ligas ĝin al mondo kie ekzistas la aliaj. Pro tio, ni kredas je la neceso daŭrigi la dialogon. La dialogo estas vojo kiu do-

nas estontecon al la mondo, ĉar ĝi ebligas la kunvivadon. La dialogo ne lasas sendefendaj: ĝi protektas. Ĝi puŝas ĉiujn vidi la plej bonajn elementojn de la alia kaj radikiĝi en la plej bonaj el si mem. La dialogo transformas la fremdulon en amikon kaj liberigas disde la demono de perforto. La dialogo estas la arto de la kuraĝuloj kiu kuracas la vundojn de la divido kaj regeneras profunde nian vivon.

Perforto estas ĉies malvenko. La arto de dialogo malplenigas kun la paso de la tempo, ankaŭ la motivojn de la teroro kaj forprenas spacon de la maljusteco, kiu estigas rankoron kaj perforton.

El Milano ni petas antaŭ ĉio al ni mem kaj al ĉiuj bonavolaj viroj kaj virinoj vivi la kuraĝon por nova humanismo bazita sur la respektivaj religiaj kredoj. Ĝi estas la unika vojo kiun ni konsistas por konstrui mondon de paco.

Ke Dio donu finfine al nia epoko la mirandan donacon de la paco.

Milano, la 7an de septembro 2004

Informon kompilis:

Marija BELOSEVIC
kaj Carlo SARANDREA

Gratulojn al niaj legantoj Pastoro Bayo AFOLARANMI el Niĝerio kaj Elmer ESCOTO el Honduro, kies artikoloj aperis en la plej nova numero de *Dia Regno* (julio-aŭgusto 2004).

Ĉu vi mem konas *Dian Regnon*? Krom respondecari pri tiu grupo, mi ankaŭ estas la reprezentanto de KELI en Usono, do mi volonte sendos provnumeron de *Dia Regno* al vi (ankaŭ al tiuj, kiuj ne loĝas en Usono). Skribu al mi kun via adreso.

Korajn salutojn de

Jerry VEIT, espero@milwpc.com

MORTO, KIE ESTAS VIA VENKO?

Ho morto, kie estas via venko? Ho morto, kie estas via pikilo? La pikilo de la morto estas la peko; kaj la forto de la peko estas la leĝo; sed danko estu al Dio, kiu donas al ni la venkon per nia Sinjoro Jesuo Kristo.

(1 Kor 15:55-57)

Oni ne parolas pri la morto

Por la nekredemuloj, la morto estas *la reĝo de teruroj* (Ijob 18:14); por ni kredantoj, *morti estas gajno* (Fil 1:21).

La homo klopodas forigi de sia menso pensojn pri morto. Nuntempe oni ne vestiĝas per vestoj de priploro tre longe post morto de iu amata.

Oni fidas je la medicino por atingi pli longan kaj sensuferan vivon, sed morto estas neevitebla. Kun la mortantoj oni ne parolas pri ties fatala fino. Oni ne diras „li mortis”, sed simple „ĉio finiĝis”, kvazaŭ la parolanto timas pri tiu vorto.

En la Psalmo 23 David skribis: *Eĉ kiam mi iros tra valo de densa mallumo* [vidu noton], *Mi ne timos malbonon, ĉar Vi estas kun mi*. En kelkaj alilingvaj versioj (ekz.: la portugala, hispana, angla, itala, franca), tio legeblas kiel: *Eĉ kiam mi iros tra valo de ombro de morto*. Li ne skribis „valo de la morto” sed „de densa mallumo”. Tio igis iun evangeliiston diri *La morto estis venkita; nur ĝia ombro restas. Neniu timas ombron, ĉar ombro ne povas bari vojon*.

Jesuo Kristo per Sia ofero sur la krucopagis la pekojn de ĉiuj, kiuj fidas je Li. Li akiris por tiuj eternan vivon. Kaj Lia relevigo el la morto pravas, ke li venkis la morton. Por ni, kredantoj: *kiam ĉi tiu putrema [korpo] surmetos senputrecon, kaj ĉi tiu mortema surmetos senmortecon, tiam plenumiĝos la skribita diro: La morto forglutiĝis en venko* (1 Kor 15:54).

Noto: La originala hebrea vorto estas *tsalmaveth* (Strong-numero H6757) kaj ĝiaj signifoj estas „ombro de morto”, „profunda ombro”, „mallumego”. Zamenhof preferis ĝin traduki kiel „densa mallumo”.

Elmero ESCOTO

LA MEZURO DE DIA KOMPATEMO

Kiam mi antaŭnelonge kun okulspecialistoj laboris en moldovaj prizonoj, okazis ke ni povis helpi al malforte vidanta malliberulo per okulvitroj por proksima vido. Li, maljuna viro, estis ege ege ĝoja kaj feliĉa kiam li akceptis la malgrandan donacon el la manoj de helpanto, kiu estis falinta en ĉi tiun surteran inferon kvazaŭ el la ĉielo. Li spertis tion kiel grandan favoron. Kaj vidu: post iom da tempo li revenis, alportante krucifikson kun korpuso, kiun li mem estis arte kaj lerte tranĉinta, kvankam per tre limigita vidpovo... Tiun geston li faris por vortigi sian neesprimeblan dankon, ĉar li parolis nur moldave kaj ruse. Mane kaj piede li klopodis komprenigi al ni, ke li sidas ĉi tie senkulpa. Nu, vi sciu, ke ĉe la piedoj de la krucumita Jesuo li estis kaligrafie skribinta tekston el la Sankta Evangelio laŭ la prikskribo de Luko (6:38): *Per kia mezuro vi mezuras, per tia oni remezuros al vi.*

Kiam mi decidis elekti ĉi tiujn vortojn, mi intencis kuntekste legi ilin. Kaj min frapis ke subite aperis sub miaj okuloj 'La Ora Regulo', t.e. „Kiel vi volas, ke la homoj faru al vi, faru ankaŭ al ili tiel same”. La granda rabeno HIL-LEL, kiun Dr L.L. ZAMENHOF plurfoje citis, formulis ĝin negative (Kiel vi ne volas, ke la homoj faru al vi, ne faru ankaŭ al ili). Temas pri la konstitucio por pli bona mondo survoje al la alveno de la Dia Regno.

Trifoje oni povas aŭdi la demandon: 'kian dankon vi havas?'; laŭlitere oni povus traduki ankaŭ: 'kia graco estas al vi?'

Jesuo parolas pri granda rekomenco, t.e. ni estos gefiloj de la Plejaltulo, Kiu „estas bona al la nedankemuloj (= tiuj infanoj, kiuj ne pretas ambaŭmane akcepti gracojn kaj favorojn el la mano de sia ĉiela Patro) kaj malbonuloj (nome tiuj kiuj ne vivas laŭ La Ora Regulo). La kompatemo de tiu Patro estu modelo, invito kaj inspiro por la nia! Ĉar Li ne juĝas kaj kondamnas, sed donante kaj pardonante liberigas nin de niaj ŝuldoj kaj kulpoj kaj de ĉiu malbono.

Kaj kiom granda (greke: multa), gracoplena estas la rekomenco flanke de Dio? Kia estas lia mezur(il)o? Jesuo superlativas per la plej fortaj adjektivoj por indiki la senlimecon de la mezuro, kiun la Patro pripensas en sia koro: „bonan mezuron, premitan, kunskuitan, superfluantan, oni donos en vian sinon” (greke: ili, t.e. tiuj, kiuj spertis la benan kaj gracan efikon de La Ora Regulo; malamikoj, malamantoj, malbenantoj, insultantoj, al kiuj turniĝis la alia vango!). Ili donos ĝin en vian sinon. Ne 'en viajn manojn', sed ĝuste en la lokon kie naskiĝas la kompatemo, la sidejo de la mizerikordo. La homa koro kaj la homa kapo ne kapablas kapti la abundon kaj amplekson de la rekompenca mezuro, per kiu la Patro remezuras siajn kompatemajn infanojn.

Ke ni sincere kaj elkore danku Dion por tiom da gracoj kaj favoroj!

**Medito fare de Jacques TUINDER
kadre de kongresa matenpreĝo**